

La heroo vivo de Henri Dunant, 3-a parto
Claude Gacond, 98-a radioprelego, 1964.10.14 & 17

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la heroo vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la trian elsendon.

La religia atmosfero, en kiu banis la infaneco de Henri Dunant, estas eksterordinara. La Sanktaj Skriboj influas la familian vivon de la mateno ĝis la vespero, de la naskiĝo ĝis la morto.

Kiam Henri naskiĝas la 8-an de majo 1828, la unuaj pensoj de lia juna patrino estas dankvortoj al la Eternulo. Dum la akuŝistino rikoltas la kriantan unuan filon de la familio, la patrino preĝas Dion. La okuloj levitaj al la ĉielo ŝi arde petegas Lian benon por la novnaskito. Ŝia konversacio kun la Eternulo daŭras longajn minutojn.

La patro ankaŭ esprimis sian ĝojon posedi heredanton pere de la religio. Li venigis pastoron, kiu legos, la saman vesperon, antaŭ publiko de amikoj kaj najbaroj, erojn el la Sanktaj Skriboj. Li ilin komentarios, kaj poste flustre preĝos dum longaj minutoj vokante la Dian benon sur Henri Dunant.

En tiu medio tipe kalvinista la tradicio volas, ke prediko apertu kaj fermu la pordojn de la vivo.

Henri infanos en la proksimeco de Dio. Ĉiutage, de sia vekiĝo al sia enlitiĝo, li konstatos, ke estas kaŭzoj preĝi. Matene oni petas la protekton de Dio por la infanoj, por la urbestroj, por la profesoroj kaj por ĉiuj suferantoj en la urbo kaj en la mondo. Antaŭ ĉiu manĝo oni dankas Dion kaj pensas al tiuj, kiuj ne havas nutron por satigi sian malplenan stomakon. Post la manĝoj oni refoje dankas Dion. Vespere en familia kunveno la patro malfermas la Biblion kaj legas unu el ĝiaj ĉapitroj.

En tiu epoko predikantoj anoncis la baldaŭan revenon de Kristo sur la Teron kaj la Universalan Savon. Ofte sinjorino Dunant kondukas siajn tri geknabojn al tiuj predikoj, kiuj ankaŭ anoncas la finon de la mondo kaj vokas la geaŭdantojn al konvertiĝo. Oni nomas tiun religian movadon **la Veko**.

En tiu medio la pasioj estas severe malpermesataj. Kontrolu viajn dirojn en la salonoj, neniam aludu ridindaĵon, evitu la vortludojn, interesiĝu pri la homamaj problemoj: la abolicion de la mortpuno, la prizonan reformon, la labor-leĝaron, aŭ diskutu pri botaniko, numismatiko, arkeologio, kemio aŭ fiziko. Ankaŭ ne forgesu, ke pri la monaj aferoj oni parolas nur dum la komerca laboro. En la salono oni evitas tiun ĉi temon.

Henri Dunant, kiu en la Kolegio ĉefe rikoltas religiajn premiojn, renkontiĝas kun amikoj por fari ekskursojn en la ĉirkaŭaĵo: kaj sur la vojoj, kiuj kondukas al la Monto Salève aŭ al la Ĵurasaj suproj, ili diskutas pri la mizero de l'jobo, pri la tento de Jesuo kaj pri la noblaj homamaj taskoj, kiuj ilin atendas. Tiuj samaj amikoj renkontiĝas regule po unu vesperon semajne ĉe Henri Dunant mem por legi la Biblion, mediti, preĝi kaj diskuti la aktualizaĵojn. Tiuj kunvenoj de la ĵaŭdo baldaŭ transformiĝas en **Junulara Kristana Unio**, en la franca lingvo **Union chrétienne des jeunes gens**. Henri estas 21-jara. Li fariĝas la sekretario de tiu movado. Lia ideo estas starigi en aliaj urboj similan junularan kristanan union. Du medicinistaj studentoj, Gilbert kaj Mercier, ĵus foriras al Parizo. En tiu granda urbo ili fondas similan societon, kiu post unu monato jam estos varbinta tridekon da aliĝantoj. Henri Dunant volas unuigi tiun parizan sekcion kun tiu, kiu jam ekzistas en Ĝenevo kaj kun la aliaj, kiujn li deziras fondi en diversaj urboj. Li tuj pensas tuteŭrope. Li skribas al pastoroj en Romandio, Francio kaj Nederlando, petas al pastoro Merle d'Aubigné rekomendajn leterojn, redaktas cirkuleran leteron, kiu anoncas lian alvenon en diversajn urbojn. Liaj leteroj obtenas grandan sukceson. Sekcioj kreiĝas eĉ en urboj ĝis tiam ribelemaj al la protestantismo. Tamen kontraŭstaro organiziĝas en aliaj lokoj. Henri Dunant migras de loko al loko. Li traveturas

La heroa vivo de Henri Dunant, 3-a parto
Claude Gacond, 98-a radioprelego, 1964.10.14 & 17

Alzacon, Belgion, Nederlandon kaj revenas en Francion. Dank'al lia misia laboro grupoj kreiĝas, kreskas kaj fariĝas influpovaj. Ĉiusemajne alvenas dekoj da mesaĝoj el tiuj grupoj al la ĝeneva sekretario, kiu dediĉas siajn noktojn por verki la necesajn respondojn kaj kuraĝigi tiujn, kiu perdas la esperon.

Estas interese ekzameni la labormetodon de nia juna sekretario, ĉar ĝi klarigas tiun de la fondonto de la Ruĝa Kruco. Henri Dunant sendas longajn leterojn, kiuj ne nur petas kunlaboron, sed ordonas laboron kaj donas respondecojn. La rezulto estas, ke li preskaŭ ĉiam obtenas la antaŭviditan sukceson.

« Sinjoro pastoro Jaquet, li ekzemple skribas, ĉar via bofrato havis la bonecon doni al mi vian adreson, min invitante skribi al vi, mi tion faras kun plezuro pro la kristana amo, kiun mi havas por vi, kiel ankaŭ en la espero, ke la klarigoj, kiujn mi donos al vi ĉi sube, vin interesos kaj vin instigos doni al ni vian asoci-promeson, ĉar ni proponas al vi nian amikecon kun ĝojo... »

Kiel vi konstatas per tiu letera citaĵo, la stilo de tiuj mesaĝoj estas bombasta. Tamen tiuj epistoloj sukcesos veki multe da entuziasmo por la ideo de Henri Dunant. La rezulto de tiu agado estas **Universala Konferenco**, kiu kunigas en 1855 en Parizo interesulojn venintajn el tuta Eŭropo. Henri Dunant reprezentas en tiu Konferenco la ĝenevan grupon. Li ludas grandan rolon en la diskutoj kaj kiam li revenas en Ĝenevon estas naskiĝinta la **Universala Alianco de la Junularaj Kristanaj Unuiĝoj**.

Dank'al sia sekretaria laboro Henri Dunant larĝigas sian horizonton. Li konatiĝas kun plej diversaj filantropaj medioj. Li ekzemple renkontas sinjorinon Beecher-Stowe, la verkistinon de la fama verko **La kabano de onklo Tom**. Estas en junio 1853 unu jaron post la eldono de la libro kontraŭ la sklaveco. En la salono de sinjorino Fazy-Meyer, tiu renkonto en Ĝenevo kun la romanistino, kiu kuraĝe batalas kontraŭ la antaŭjuĝoj favorantaj la sklavecon, havis grandan influon sur la estonta aŭtoro de **Rememoro pri Solferino**.

Ni multobligos la tekston de tiuj elsendoj pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-